eltiraĵo de

# Kongreslibro

**La 43a Korea Kongreso de Esperanto**
**La 98a Japana Esperanto-Kongreso**
**sub la temo de:**
**Esperanta amikeco kaj interkompreniĝo trans la maro**

**De la 7a ĝis la 9a de oktobro 2011**
**en Seongnam, apud Seulo, Koreio**

**paralele:**
**La 30-a Komuna Seminario**
**inter Ĉina, Japana kaj Korea Junularoj**
**sub la temo de:**
**Etaj Esperantaĵoj en nia vivo**

# Eltiraĵo de Kongreslibro

## Enhavo

4. Plano de la kongresejo ........................................................................3
4-1. La tuta kongresejo (3)   4-2. Diskutejo kaj loĝejo (4)
5. Laŭhora tabelo de programeroj ..............................................................5
6. Laŭhora listo de programeroj ................................................................8
6-1. Komuna Kongreso (8)   6-2. Komuna Seminario (10)
7. Oficialaj programeroj de Komuna Kongreso .........................................11
8. Fakkunsidoj .............................................................................................15
9. Budoj .......................................................................................................20
10. Ekskursoj ...............................................................................................22
10-1. Duontagaj Ekskursoj (22)   10-2. Postkongresa Ekskurso (23)
10-3. Ekskurso de Komuna Seminario (23)

# 4. Plano de la kongresejo

## 4-1. Plano de la tuta kongresejo



## 4.2 plano de la diskutejo kaj loĝejo

Loĝejoj C, D estas apartaj konstruaĵoj. Kelkajn minutojn for de la ĉefa konstruaĵo.

### Loĝejo / Diskutejo

| etaĝo | A ĉambro | | A personoj | A ĉambro | | A personoj | B ĉambro | | B personoj | B ĉambro | | B personoj |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 4 | 408 | | (4) | 416 | | (6) | 404 | | (14) | 408 | | (7) |
| | 407 | | (4) | 415 | | (2) | | | | | | |
| | 406 | | (4) | 414 | | (2) | 403 | | (14) | 407 | | (7) |
| | 405 | | (4) | 413 | | (2) | | | | | | |
| | 404 | | (4) | 412 | | (2) | 402 | | (14) | 406 | | (7) |
| | 403 | | (4) | 411 | | (2) | | | | | | |
| | 402 | | (4) | 410 | | (2) | 401 | | (14) | 405 | | (7) |
| | 401 | | (4) | 409 | | (2) | | | | | | |
| 3 | 308 | | (4) | 316 | | (6) | 304 | | (14) | 308 | | (7) |
| | 307 | | (4) | 315 | | (2) | | | | | | |
| | 306 | | (4) | 314 | | (2) | 303 | | (14) | 307 | | (7) |
| | 305 | | (4) | 313 | | (2) | | | | | | |
| | 304 | | (4) | 312 | | (2) | 10 | Diskutejo | (30) | 306 | | (7) |
| | 303 | | (4) | 311 | | (2) | | | | | | |
| | 302 | | (4) | 310 | | (2) | 9 | Diskutejo | (30) | 305 | | (7) |
| | 301 | | (4) | 309 | | (2) | | | | | | |
| 2 | 4 | Diskutejo | (30) | 208 | | (6) | 8 | Diskutejo | (30) | 208 | | (7) |
| | | | | 207 | | (2) | | | | | | |
| | 3 | Diskutejo | (30) | 206 | | (2) | 7 | Diskutejo | (30) | 207 | | (7) |
| | | | | 205 | | (2) | | | | | | |
| | 2 | Diskutejo | (30) | 204 | | (2) | 6 | Diskutejo | (30) | 206 | | (7) |
| | | | | 203 | | (2) | | | | | | |
| | 1 | Diskutejo | (30) | 202 | | (2) | 5 | Diskutejo | (30) | 205 | | (7) |
| | | | | 201 | | (2) | | | | | | |
| 1 | 109 | 110 | 111 | 112 | 113 | 114 | 101 (2) | 102 (2) | 103 (2) | 104 (2) | 105 / 107 | 106 / 108 |
| | 108 | | | Duŝejo / Necesejo Lavejo | | 115 (6) | | | | | 12 Diskutejo | |
| | 107 / 106 / 105 | | 104 | 103 | 102 | 101 | Enirejo | | | | 11 Diskutejo | |

| C ĉambro | | C personoj |
|---|---|---|
| 306 | | (7) |
| 305 | | (17) |

| D ĉambro | | D personoj |
|---|---|---|
| 306 | | (7) |
| 305 | | (7) |
| 304 | | (7) |
| 303 | | (7) |
| 206 | | (7) |
| 205 | | (7) |
| 204 | | (7) |
| 203 | | (7) |
| 106 | | (7) |
| 105 | | (7) |
| 104 | | (7) |
| 103 | | (7) |

# 5. Laŭhora tabelo de programeroj

## 7a de okt. (vendredo)

| | preparado/akcepto | 13:00-14:30 | 14:40-16:10 | 16:20-17:50 | vespermanĝo | 19:30-21:00 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | |
| **halo** | preparado | akceptejo/budoj | akceptejo/budoj | akceptejo/budoj<br>[F-25] Danco-Bluso | | |
| | | | | | | |
| **lekciejo 3 (208)** | | | rezervo | rezervo | | [O-1] Interkona Vespero |
| | | | | | | |
| **lekciejo 1 (84)** | | Komuna Seminario | Komuna Seminario | Komuna Seminario | | Komuna Seminario |
| | | | | | | |
| **diskutejo 1 (30)** | | rezervo | [F-3] Pasporta Servo | [F-5] Junularaj eventoj | | |
| | | | | | | |
| | | | | | | |
| | | | | | | |
| | | | | | | |
| | | | | | | |
| | | | | | | |
| | | | | | | |
| | | | | | | |
| **diskutejo 12 (30)** | LKK/TEKO/JKK | LKK/TEKO/JKK | LKK/TEKO/JKK | LKK/TEKO/JKK | LKK/TEKO/JKK<br>kunveno | LKK/TEKO/JKK |
| | | | | | | |
| **manĝejo** | | | | | **18:20-19:20** | |
| **ekstere** | | | | | | |

■[O-x] oficiala programero, [F-x] fakkunsido.

■Diskutejo 12 estas laborĉambro de LKK/JKK.

■Budoj en la halo: [B-1] Gunma E-Societo, [B-2] Libroservo de JEI, [B-3] Libroteko Tokio, [B-4] Jokohama E-Rondo, [B-5] La 99a Japana Kongreso, [B-6] Korea E-Asocio, [B-7] Japana Esperanto-Junularo, [B-8] Pentraĵa ekspozicio, [B-9] Rondo KTP, [B-10] Esperantista Asocio de Ŭonbulismo, [B-11] Farado de portreto de Zamenhof, [B-12] Oomoto, [B-13] JUSTAO

# 8a de okt. (sabato)

| | matenmanĝo | 9:30-10:50 | 11:00-12:30 | tagmanĝo | 13:30-15:00 | 15:10-16:40 | komuna manĝo | 18:40-21:10 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| **aŭditorio (407)** | | [O-2] Malferma soleno | [O-3] Prelegoj 1 | | [O-3] Prelegoj 2 | [O-3] Prelegoj 3 | | [O-5] Festa Vespero |
| **halo** | | | akceptejo/budoj | | akceptejo/budoj [F-25] Danco-Valso | akceptejo/budoj | | |
| | | | | | | | | |
| **lekciejo 2 (120)** | | | [F-16] Lando de Esperanto | | [F-17] Natur-amikoj | [F-22] E-rondoj | | |
| **lekciejo 1 (84)** | | | Komuna Seminario | | Komuna seminario | Komuna seminario | | |
| | | | | | | | | |
| **diskutejo 1 (30)** | | | Komuna Seminario | | Komuna Seminario | Komuna Seminario | | |
| **diskutejo 2 (30)** | | | [F-6] Histori-lernolibro | | [F-19] Ŭonbulismo | [F-14] Oomoto | | |
| **diskutejo 3 (30)** | | | [F-9] Origamio | | [F-8] SAT | [F-7] ILEI | | |
| **diskutejo 4 (30)** | | | [F-4]Azia Agado | | [F-1] Go-kunveno 1 | [F-1] Go-kunveno 2 | | |
| **diskutejo 5 (30)** | | | [F-18] Infana kurso | | [F-2] Kristano | [F-13] Budhano | | |
| **diskutejo 6 (30)** | | | [F-15] Kantu esperante 1 | | [F-27] Podkasto | [F-21] Raciaj ciferoj | | |
| **diskutejo 7 (30)** | | | [F-11] Akupunkturo 1 | | [F-11] Akupunkturo 2 | [F-26] Gustumi gimĉion | | |
| **diskutejo 8 (30)** | | | rezervo | | rezervo | [*F-23-1] Komencantoj | | |
| | | | | | | | | |
| **diskutejo 12 (30)** | LKK/TEKO/ JKK | LKK/TEKO/JKK | LKK/TEKO/JKK | LKK/TEKO/JKK | LKK/TEKO/JKK | LKK/TEKO/JKK | LKK/TEKO/JKK | LKK/TEKO/ JKK |
| | | | | | | | | |
| **manĝejo** | **7:45-8:45** | | | **12:30-13:30** | | | [O-4] Komuna Manĝo **17:00-18:30** | |
| **ekstere** | | | | | | | | |

■Programeroj kun asterisko* estas rekomendindaj al komencantoj.

# 9a de okt. (dimanĉo)

| | matenmanĝo | 9:30-11:00 | 11:10-12:30 | tagmanĝo | 13:30-15:00 | | vespermanĝo | 19:00-21:00 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| halo | | budoj | budoj | | | | | |
| lekciejo 3 (208) | | [F-10] Libro-horo | [O-6] Kunsido de JEI | | [O-8] Ferma Soleno | | | |
| lekciejo 2 (120) | | [F-20] E.SHA epoko | [O-7] Kunsido de KEA | | | | | |
| lekciejo 1 (84) | | Komuna Seminario | Komuna Seminario | | | | | |
| diskutejo 1 (30) | | Komuna Seminario | Komuna Seminario | | | | | |
| diskutejo 2 (30) | | [F-15] Kantu esperante 2 | [*F-23-2] Komencantoj | | | | | |
| diskutejo 3 (30) | | [F-12] Delegita Reto de UEA | [F-24] Manĝ-kulturoj | | | | | |
| diskutejo 4 (30) | | [F-28] Mongola Centro de UHA | rezervo | | | | | |
| diskutejo 12 (30) | LKK/TEKO/JKK | LKK/TEKO/JKK | LKK/TEKO/JKK | LKK/TEKO/JKK | LKK/TEKO/JKK | LKK/TEKO/JKK | LKK/TEKO/JKK | LKK/TEKO/JKK |
| manĝejo | 7:45-8:45 | | | 12:30-13:30 | | | 18:00-19:00 | |
| ekstere | | | | | | | | |

■Programeroj kun asterisko* estas rekomendindaj al komencantoj.
■Post la ferma soleno sekvos 4 duontagaj ekskursoj, [D-1], [D-2], [D-3] kaj [D-4]

## La 10a de okt. (lundo)

- ■ Matenmanĝo ĉe manĝejo, 7:00-8:00
- ■ Japana karavano A forlasos la kongresejon frumatene.
- ■ Postkongresa Ekskurso ekros je la 9a matene.

# 6. Laŭhora listo de programeroj

Programeroj de Komuna Kongreso okazos en aŭditorio, lekciejo 2, lekciejo 3, kaj diskutejo 2-8.

## 6-1. Komuna Kongreso

### 7a (vendredo)

| | |
|---|---|
| 13:00 - | Ekfunkcio de akceptejo (halo) |
| 13:00 - | Ekfunkcio de budoj (halo) |
| 14:40 - 16:10 | Pasporta Servo [F-3] (diskutejo 1) |
| 16:20 - 17:50 | Danco-bluso [F-25] (halo) |
| | Junularaj eventoj [F-5] (diskutejo 1) |
| 18:20 - 19:20 | Vespermanĝo (manĝejo) |
| 18:50 - 19:20 | Kunveno de LKK, TEKO kaj JKK (diskutejo 12) |
| 19:30 - 21:00 | Interkona Vespero [O-1] (lekciejo 3) |

### 8a (sabato)

| | |
|---|---|
| 7:45 - 8:45 | Matenmanĝo (manĝejo) |
| 9:30 - 11:00 | Malferma Soleno [O-2] (aŭditorio) |
| | Komuna fotado |
| 11:00 - 12:30 | Prelegoj (1) [O-3] (aŭditorio) |
| | Lando de Esperanto [F-16] (lekciejo 2) |
| | Histori-lernolibro [F-6] (diskutejo 2) |
| | Origamio (paperfald-ludo) [F-9] (diskutejo 3) |
| | Azia agado [F-4] (diskutejo 4) |
| | Infana kurso [F-18] (diskutejo 5) |
| | Kantu esperante (1) [F-15] (diskutejo 6) |
| | Akupunkturo (1) [F-11] (diskutejo 7) |
| 12:30 - 13:30 | Tagmanĝo (manĝejo) |
| 13:30 -15:00 | Prelegoj (2) [O-3] (aŭditorio) |
| | Danco-valso [F-25] (halo) |
| | Natur-amikoj [F-17] (lekciejo 2) |
| | Ŭonbulismo [F-19] (diskutejo 2) |
| | SAT [F-8] (diskutejo 3) |
| | Go-kunveno (1) [F-1] (diskutejo 4) |
| | Kristano [F-2] (diskutejo 5) |
| | Podkasto [F-27] (diskutejo 6) |
| | Akupunkturo (2) [F-11] (diskutejo 7) |

| | |
|---|---|
| 15:10 - 16:40 | Prelegoj (3) [O-3] (aŭditorio) |
| | Esperanto-rondoj [F-22] (lekciejo 2) |
| | Oomoto [F-14] (diskutejo 2) |
| | ILEI [F-7] (diskutejo 3) |
| | Go-kunveno (2) [F-1] (diskutejo 4) |
| | Budhano [F-13] (diskutejo 5) |
| | Raciaj ciferoj [F-21] (diskutejo 6) |
| | Gustumi Gimĉion [F-26] (diskutejo 7) |
| | Komencantoj (1) [*F-23-1] (diskutejo 8) |
| 17:00 - 18:30 | Komuna manĝo [O-4] (manĝejo) |
| 18:40 - 21:10 | Festa Vespero [O-5] (aŭditorio) |

## 9a (dimanĉo)

| | |
|---|---|
| 7:45 - 8:45 | Matenmanĝo (manĝejo) |
| 9:30 - 11:00 | Libro-horo [F-10] (lekciejo 3) |
| | E.SHA epoko [F-20] (lekciejo 2) |
| | Kantu esperante (2) [F-15] (diskutejo 2) |
| | Delegita Reto de UEA [F-12] (diskutejo 3) |
| | Mongola Centro de Universala Homama Asocio [F-28] (diskutejo 4) |
| 11:10 - 12:30 | Kunsido de JEI [O-6] (lekciejo 3) |
| | Kunsido de KEA [O-7] (lekciejo 2) |
| | Komencantoj (2) [*F-23-2] (diskutejo 2) |
| | Manĝkulturoj [F-24] (diskutejo 3) |
| 12:30 - 13:30 | Tagmanĝo (manĝejo) |
| 13:30 - 15:00 | Ferma Soleno [O-8] (lekciejo 3) |
| 15:30 | Ekiro de 4 duontagaj ekskursoj |
| | [D-1], [D-2], [D-3], [D-4] Vidu paĝon 27. |
| 18:00 - 19:00 | Vespermanĝo (manĝejo) |

## 10a (lundo)

| | |
|---|---|
| 7:00 - 8:00 | Matenmanĝo (manĝejo) |
| 9:00 - | Ekiro de Postkongresa Ekskurso |

## 6-2. Komuna Seminario

Komuna Seminario okazos en du ĉambroj: lekciejo 1 kaj diskutejo 1. Tiu ĉi listo povas esti provizora. Pri precizaj informj turnu vin al la organizantoj de KS surloke.

### 7a (vendredo)

| | |
|---|---|
| 13:00 - | Akcepto (halo) |
| 18:30 - | Vespermanĝo (manĝejo) |
| 19:30 - | Interkona Vespero, antaŭvido (lekciejo 1) |

### 8a (sabato)

| | |
|---|---|
| 8:30 - | Matenmanĝo (manĝejo) |
| 9:30 - | Malferma Soleno [kun Komuna Kongreso] (aŭditorio) |
| 11:00 - | Malfermo de la 30-a Komuna Seminario (lekciejo 1) |
| 12:00 - | Lerni korean lingvon (lekciejo 1) |
| 12:30 - | Tagmanĝo (manĝejo) |
| 13:30 - | Eksteraj programeroj (ekstere) |
| 15:00 - | Prezenti junularan movadon en aziaj landoj/ Diskuti pri la ĉefa temo: Etaj Esperantaĵoj en nia vivo (lekciejo 1) |
| | Baza Esperanto-kurso (diskutejo 1) |
| 18:00 - | Ripozo |
| 18:30 - | Vespermanĝo (manĝejo) |
| 19:30 - | Interkona Vespero (lekciejo 1) |

### 9a (dimanĉo)

| | |
|---|---|
| 8:30 - | Matenmanĝo (manĝejo) |
| 9:30 - | Gimnastiko/Streĉado (ekstere) |
| 10:30 - | Diskuto pri azia junulara movado (lekciejo 1) |
| | Kurso de Esperanto (diskutejo 1) |
| 11:30 - | Prezento pri la IJK2012 en Japanio (lekciejo 1) |
| 12:30 - | Tagmanĝo (manĝejo) |
| 13:30 - | Fermo de la 30-a Komuna Seminario (lekciejo 1) |
| 15:00 - | Ekskurso 1: Sperti Ĉimĝilbang (saŭno) en Koreio |

### 10a (lundo)

| | |
|---|---|
| 7:30 - | Matenmanĝo (manĝejo) |
| 9:30 - | Ekskurso al urbo Suwon |

## 7. Oficialaj programeroj de Komuna Kongreso

**[O-1]** Interkona Vespero (7a, 19:30-21:00, lekciejo 3)

Prezento de la membroj de LKK; konciza klarigo de fakkunsidoj; Koruso de kantoj "La hejmloko" kaj "Printempo de la Hejmloko", kantoj, pupteatraĵo, muziko, dancoj, karaoke-o ktp. Ni amuziĝu kaj interkonatiĝu! Prezidos s-ro PARK Yongsung [Nema]

**[O-2]** Malferma Soleno (8a, 9:30-10:50, aŭditorio)

1. Deklaro de malfermo
2. Saluto de organizantoj, la prezidantoj de KEA, JEI, KEJ (KS)
3. Saluto de la prezidanto de LKK (HO Song)
4. Salutoj de reprezentantoj de landaj asocioj (Vjetnamio, Mongolio, Ĉinio kaj aliaj)
5. Prezento de gratulmesaĝoj
6. Festoparoloj
   de s-ro MA Youngtae
   de s-ro YAMASITA Tosihiro
7. Klarigo pri la kongresa memoraĵo (reprezentanto de Japana TEKO)
8. Kanto de "La Espero"
9. Komuna fotado

[**O-3**] Prelegoj

<u>(1) (8a, 11:00-12:30, aŭditorio)</u>

[P-1] "Esperanto inter la japana kaj korea popoloj -OOYAMA Tokio kaj lia tempo"

En la 1920-30aj jaroj, kiam Japanio regadis Koreion, Esperanto ludis unikan rolon inter la japana kaj korea popoloj. Certaj esperantistoj el ambaŭ nacioj uzis la neŭtralan komunan lingvon por pli bona interkompreniĝo. Kun limigitaj rezultoj, iliaj agoj estas ja notindaj el historia vidpunkto. OOYAMA Tokio kaj aliaj figuroj estos prilumitaj kun la helpo de siatempaj materialoj. Prelegos profesoro GOTOO Hitosi, de Universitato Tohoku. (60 minutoj)

[P-5] "La Katastrofo en nia regiono"

Pri la tertremo kaj cunamo okazintaj en Japanio en la 11a de marto raportos s-ino SAITO Tume. (30 minutoj)

(2) (8a, 13:30-15:00, aŭditorio)

[P-2] “Belarta Merkato de Japanio kaj Koreio”

Ĉu vi ĝuas la vivon de arto kaj kulturo? En la epoko de kulturo ni esperantistoj vivu la vivon ne nur por la movado de Esperanto, sed ankaŭ por la kulturigo de sia vivo, kio donos la feliĉon kaj krean ideon, eĉ monon. Oni vidos la mondon de belarta merkato de Koreio kaj Japanio. Artistoj de Koreio Park Sookeun, Lee Joongsup, Kim Whanki, Lee Ufan, kaj tiuj de Japanio, Takashi Murakami, Yayoi Kusama, Nara Yoshitomo ktp. Krom la du-landaj artistoj, oni povas renkonti kelkajn famajn samtempajn artistojn de Ĉinio, Zhang Ziaogang, Zeng Fanzhi, kaj tiujn de Bharato, Subodh Gupta, Jitish Kallat, Santosh. Per la prezento oni havos la ŝancon pensi ankaŭ la signifon de azio kaj aziajn landojn. Prelegos d-ro SO Jin-su, profesoro de Universitato Kangnam. (60 minutoj)

[P-6] “Universala Kongreso de Esperanto en Vjetnamio”

Prelegos f-ino Nguyen Hoang Yen. (30 minutoj)

(3) (8a, 15:10-16:40, aŭditorio)

[P-3] “Kanto bela, vivo stela”

Prelego de la premiito de la Premio Ossaka 2011, s-ro JAMADA Tadaŝi (20 minutoj)

[P-4] “Kompleksio kaj Sano”

Tute nova medicina sistemo estis iniciatita de LEE Jema (1836-1900) ĉirkaŭ 100 jarojn antaŭe en la posta epoko de la korea dinastio Chosun. En 1894 LEE Jema asertis, ke ĉiu homo naskiĝas kun malsama strukturo de la organoj kaj sekve diferencas per karaktero, temperamento, fiziologia kaj patologia fenomenoj. Do li asertis, ke kvankam homoj havas la saman malsanon, oni devas uzi diferencajn medikamentojn konforme al ilia respektiva denaska strukturo de la organoj. Li aŭdace kritikis la senkritike transdonatan dum miloj da jaroj jaman sistemon de ĉina medicino kaj eĉ skuis ĝian radikon, kio ja estis surpriza okazaĵo sub la siatempa situacio, en kiu potence regis ĉina scienco. Pri la kompleksio, kiun difinis LEE Jema, prelegos d-ro CHONG Won-cho, Honora Prezidanto de KEA. (60 minutoj)

**[O-4]** Komuna manĝo (8a, 17:00-18:30, manĝejo)

Bankedeto, en kiu kolektiĝos preskaŭ ĉiuj partoprenantoj de Komuna Kongreso. Aranĝos la aferon s-ino OH Soon-mo.

**[O-5]** Festa Vespero (8a, 18:40-21:10, aŭditorio)

La ĉefaj programeroj de Festa Vespero estas subaj. Prezidos s-ino HUĜIMOTO Ricko.

[S-1] Folklora teatraĵo de grupo KTP: "La Rakonto de Chunhyang"

Fame konata am-rakonto el antikva periodo de Koreio. Ĉu la amo inter knabino Chunhyang, kiu estas filino de Gisengo (simila al japana gejŝo), kaj nobelulo Mongyong fruktos trans la baro de socia rango, malgraŭ fi-interveno de la estro de urbo Namwon? Vi vidos la rezulton.

[S-2] Japana teatraĵo "Kvin Dandaj Ŝtelistoj" de KUNII kaj la bando

Sceno de la 5 dandoj en uniformo sur la digo de rivero Inasegawa. Estis kvin ŝtelistoj, kiuj estis konataj en la tuta Japanio. Ili ŝtelis nur el egaj riĉuloj kaj la monon disdonis al malriĉuloj. Ili intencas re-disdonon de riĉeco. Tio estis unu el la sociaj asekuroj. Civitanoj amis kaj subtenis ilin, sed la registaro ne permesis ilin. Multaj persekutis ilin, kaj finfine en iu printempa nokto, antaŭ la tagiĝo, ili estis preskaŭ kaptitaj apud la urbo Kamakura. Ili komprenis la situacion kaj sur la digo de rivero Inasegawa, ĉiuj deklaris sian personecon, vestitaj en uniforma kimono (japana tradicia vesto), donacita de riĉa komercisto.

[S-3] Koreaj tradiciaj dancoj

(1) *Taepyongmu* dancos s-ino HWANG Eung-sun. Taepyongmu estas la danco, kiun reĝino mem dancis, preĝante riĉan rikolton kaj pacon de la lando, en Chosun-Dinastio.

(2) *Jinju Kyobang Gudgori* dancos s-ino KU Bu-ok. Ŝi estas diplomito por senforma kultura havaĵo de Koreio.

[S-3.1] Prezentado de Ŝimajo

Ŝimajo estas prezentaĵo de iu parto aparte elprenita de "Noa dramo", senforma monda heredaĵo en Japanio. Ĉifoje unu dancas kaj la alia ĉantas. Ni prezentos 2 Ŝimajojn. Unu nomiĝas "Takasago (Takasago estas la nomo de la loko)", la alia nomiĝas "Tsurukame (gruo kaj testudo; Ili signifas longan vivon)". "Takasago" prezentiĝas en geedziĝa ceremonio kaj "Tsurukame" estas prezentata

okaze de gratulinda afero. Prezentos la dancon s-ro OKUŬAKI Toŝiomi kun akompano de s-ro HAZAMA Hirotomi.

[S-4] Aŭa-danco

Fama festa danco en japana gubernio Tokuŝima.
S-ro TABUCHI Yasuo kaj la bando gvidos japanan folkloran dancon.

[S-5] Aŭkcio

Japanflanke: Por subteni la 68an Internacian Junularan Kongreson en Tenri, Nara, Japanio, en la 5a-12a de aŭgusto 2012, la vendo de Aŭkcio iros en la kason de Japana Esperanto-Junularo, la organizanto de la IJK kunlabore kun Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.
Respondecas japanflanke: s-ino TAHIRA Masako
Koreflanke: S-ro SO Jin-su

[**O-6**] Ĝenerala Kunsido de JEI (9a, 11:10-12:30, lekciejo 3)

Oficiala kunsido de Japana Esperanto-Instituto.

[**O-7**] Ĝenerala Kunsido de KEA (9a, 11:10-12:30, lekciejo 2)

Oficiala Kunsido de Korea Esperanto-Asocio

[**O-8**] Ferma Soleno (9a, 13:30-15:00, lekciejo 3)

1. Saluto de organizantoj: la prezidantoj de JEI, KEA, KEJ (KS)
2. Prezento de la premiitoj de Ossaka, Hajpin, kaj aliaj.
3. Prezento de la rezulto de Literatura Konkurso
4. Prezento de la rezulto de la kongreso (HO Song)
5. Invito al la 44a Korea Kongreso de Esperanto + transdono de la flago
6. Invito al la 99a Japana Esperanto-Kongreso
7. Invito al la 68a Internacia Junulara Kongreso
8. Prezento de la membroj de LKK kaj helpantoj, TEKO-japana, JKK, la laborantoj de KS
9. [S-5] Prezento de kanto "Saluton!" (s-roj JAMADA, MAKINO)
   "Saluton!" estas ĉarma kaj simpla kanto verkita de esperantisto. La muziknotaĵon vi vidas en tiu ĉi kongreslibro.
10. Kanto de "La Tagiĝo"
11. Deklaro de fermo
12. Informo pri duontagaj ekskursoj kaj pri postkongresa ekskurso

# 8. Fakkunsidoj

Programeroj markitaj per asterisko * estas rekomendindaj por novaj esperantistoj.

[**F-1**] Go-kunveno (1) (2) (8a, 13:30-15:00, kaj 15:10-16:40, diskutejo 4)

Amika go-kunveno inter japanaj kaj koreaj go-amantoj.
Organizas: Esperantista Go-Ligo Internacia
Respondecas: s-ro Nobuo SAKURAI (KN-J-22)
Vice respondecas: s-ino Hiroko SAKURAI (KN-J-23)

[**F-2**] Kristano (8a, 13:30-15:00, diskutejo 5)

Kunsido de evangeliaj kaj katolikaj kristanoj, kiuj konfesas la kredkonfeson de la Apostoloj, kun kantado de himnoj, preĝo, Biblio-legado, prediko kaj interkonatiĝo de kunsidantoj.
Organizas: Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) kaj Japana Asocio de Kristanaj Esperantistoj
Respondecas: s-ro JAMADA Tadaŝi (KN-J-116) kaj s-ro MA Youngtae
Vice respondecas: s-ro SUZUKI Keiichiro (KN-J-113)

[**F-3**] Pasporta Servo (7a, 14:40-16-10, diskutejo 1)

Kio estas ĝojo kaj problemo gastigi kaj gastiĝi per Pasporta Servo? Publika fakkunsido. Ne-membroj bonvenaj.
Organizas: Internacia Fako de Japana Esperanto-Instituto
Respondecas: s-ro YAJIMA Hiroshi (KN-J-147)

[**F-4**] Azia Agado (8a, 11:10-12:30, diskutejo 4)

Kiel kunlabori kun KAEM? Kiel kunlabori kun junulara movado en aziaj landoj? Kiel kunlabori kun Hanoja UK en 2012? Kiel kunlabori kun Azia Kongreso en Israelo en 2013? Kunsido malfermita al ĉiuj kongresanoj.
Organizas: Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado (KAEM)
Respondecas: s-ro SASAKI Teruhiro (KN-J-31)
Vice respondecas: s-ino TAHIRA Masako (KN-J-3)

[**F-5**] Junularaj eventoj (7a, 16:20-17:50, diskutejo 1)

Kunsido por sukcesigi junularajn eventojn, precipe, Internacian Junularan Kongreson (IJK) en Tenri 2012.
Organizas: Korea Esperanto-Junularo (KEJ) kaj Japana Esperanto-Junularo (JEJ)
Respondecas: s-ro YAJIMA Hiroshi (KN-J-147)

[**F-6**] Histori-lernolibro (8a, 11:10-12:30, diskutejo 2)

Simpozio: kiel priskribita la anekso en la histori-lernolibro de Japanio kaj Koreio ĉe la 100-jara datreveno de la anekso.
Organizas: Grupo por traduki la komuna-lernolibron de la moderna historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio
Respondecas: s-ro SATO Morio (KN-J-149)
Vice respondecas: s-ro KITAGAWA Syozi (KN-J-153)

[**F-7**] ILEI (8a, 15:10-16:40, diskutejo 3)

Kunsido por interkonatiĝo de ambaŭlandaj ILEI-anoj, kaj por interŝanĝo de opinioj pri instruado de Esperanto.
Organizas: Korea kaj japana sekcioj de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)
Respondecas: s-ro LEE Jungkee / s-ino ISIKAWA Tieko (KN-J-120)

[**F-8**] SAT (8a, 13:30-15:00, diskutejo 3)

Prezento de konciza historio de SAT-movado. Prezentoj de japana kaj korea SAT-movadoj. Sinprezentoj de partoprenintoj. Malfermita al ĉiuj kongresanoj.
Organizas: SAT en Japanio kaj Koreio
Respondecas: s-ro TANI Hiroyuki (KN-J-183)
Respondecas: s-ro JUNG Hyunsoo

[**F-9**] Origamio (Paperfald-ludo) (8a, 11:10-12:30, diskutejo 3)

Konciza prezento pri origamio, ĝia historio, ktp. Prezento kaj gvido al la ĉeestantoj pri la manieroj por elfaldi kelkajn origami-figurojn.
Organizas: Fakdelegito de UEA pri origamio
Respondecas: s-ro SAIKI Akira (KN-J-093)

[**F-10**] Libro-horo (9a, 9:30-11:00, lekciejo 3)

Prezento de esperantaj libroj, vortaroj ktp. eldonitaj en la lastaj jaroj. Verkintoj aŭ eldonintoj raportos pri sia verko. El Japanio: “Silento”, “Komputila Kompakta Disko de Plena Verkaro de Zamenhof”, “Raportoj el Japanio”, “Japana Esearo”, “Nudpieda Gen”, “Verkoj de Miyazawa Kenzi.” El Koreio: “Angla-Korea-Esperanta Vortaro”, “Lando de Esperanto en amuzaj ludoj”, “Etero kaj Vento kaj Steloj kaj Poemoj”, “Amuze Lernu”, “Esperanto kaj Mi (vol. 1, Koreio)” ktp.
Organizas: Libroservo de Japana Esperanto-Instituto (JEI)
Respondecas: japanflanke s-ro ISINO Yosio (KN-J-11); koreflanke s-ro MA Youngtae

[**F-11**] Akupunkturo (1) (2) (8a, 11:10-12:30, kaj 13:30-15:00, diskutejo 7)

Korea Man-akupunktura terapio (Seoguem-terapio). La organizanto gvidos bazan kurac-teorion de man-akupunkturo kaj kuracmetodon por urĝa kazo ĉe via korpa sano; kaj prezentos tuŝe per simplaj kuraciloj.
Organizas kaj respondecas: s-ro LEE Seung-yun (Junĉjo)

[**F-12**] Delegita Reto de UEA (9a, 9:30-11:00, diskutejo 3)

Prezentado de Universala Esperanto-Asocio. Pri ĝia historio (inkluzive de TEJO), laboro (Universalaj Kongresoj, la organo de UEA "esperanto", Biblioteko Hector Hodler) kaj servoj (Delegita Reto, Koresponda Servo Mondskala, Pasporta Servo). Al viaj demandoj respondos japana ĉefdelegito, HARADA, kaj korea prof. SO Jin-su. Ni ankaŭ spektu DVD-on "Vizito al la Centra Oficejo".
Respondecas: d-ro HARADA Hideki (KN-J-36)
Vice respondecas: s-ino TAHIRA Masako (KN-J-3)

[**F-13**] Budhano (8a, 15:10-16:40, diskutejo 5)

Budhana fakkunsido. Malfermita al ĉiuj kongresanoj. Budhoservo laŭ sutrorecitado en Esperanto. Klarigo pri agadoj de Budhana Ligo Esperantista. Interŝanĝo de opinioj pri budhismo en ambaŭ landoj.
Organizas: Internacia Budhana Ligo Esperantista
Respondecas: s-ro YAMAGUTI Sin'iti (KN-J-015)
Vice respondecas: s-ro MORIWAKI Yasumasa (KN-J-180)

[**F-14**] Oomoto (8a, 15:10-16:40, diskutejo 2)

Prezento pri la agadoj kaj historio de Oomoto kaj Esperanto-Populariga Asocio, kiuj precipe rilatiĝas kun Koreio. Malfermita al ĉiuj kongresanoj.
Organizas: Esperanto-Populariga Asocio
Respondecas: s-ro HAZAMA Hirotomi (KN-J-202)
Vice respondecas: s-ro OKUŬAKI Toŝiomi (KN-J-201)

[**F-15**] Kantu esperante

(1) (8a, 11:10-12:30, diskutejo 6)
(2) (9a, 9:30-11:00, diskutejo 2)
Kantu kune, japanoj kaj koreoj, la kanton "Saluton!" Ni montru la rezulton en Ferma Soleno.
Organizas: Grupo por "Kantu Esperante"
Respondecas: s-ro JAMADA Tadaŝi (KN-J-116)
Vice respondecas: s-ro MAKINO Mituo (KN-J-139)

[**F-16**] Lando de Esperanto (8a, 11:10-12:30, lekciejo 2)

Ĝuu Esperanton en diversaj eroj: esperantaj kantoj, kvizoj, kartoludoj, kaj aliaj. Rekomendinde ne nur al novaj esperantistoj sed ankaŭ al kurs-gvidantoj, kiuj volas ampleksigi sian instru-metodon. Estos farata nur en Esperanto.
Respondecas: s-ro MA Youngtae

[**F-17**] Natur-amikoj (8a, 13:30-15:00, lekciejo 2)

Ĉiuj natur-amantoj estas bonvenaj. Ni sondos eblecon de komuna agado inter japana kaj korea membraroj; prezentos rekomendindajn montojn en Koreio, kaj raportos eventojn en la intaj jaroj.
Organizas: Rondo Espera Monto
Respondecas: s-ro HAN Deoksub

[**F-18**] Infana kurso (8a, 11:10-12:30, diskutejo 5)

Kantu, ludu, amuziĝu kaj lernu Esperanton en familiara etoso. Stimulu komprenon kaj komunikadon inter geknaboj per baznivela Esperanto. Bonvenaj estas kreskintoj, kiuj amas infanon.
Respondecas: s-ino HONG Kyoungmi
Vice respondecas: s-ino SHIN Eungyeong

[**F-19**] Meditado de Ŭonbulismo (8a, 13:30-15:00, diskutejo 2)

Oni spertos meditadon, kiun ŭonbulismanoj praktikas kaj ekzercas sin. Tra la meditado, oni povas gajni mensan trankviliĝon kaj sanan korpon. Krome, en la kunsido Esperantista Asocio de Ŭonbulismo prezentos La 7-an Internacian Meditado-Renkontiĝon, kiu okazos de la 9-a ĝis la 12-a de januaro en la urbo Iksan, Koreio.
Organizas: Esperantista Asocio de Ŭonbulismo
Respondecas: s-ro KIM Kwangsoo

[**F-20**] Prezentado de E.SHA Epoko (9a, 9:30-11:00, lekciejo 2)

Ni prezentos pri la historio de faro de E.SHA Epoko kaj ke kiel tiu filmo, kiun oni montris en grandaj kinejoj de Tajvano, sukcesis havi Esperantan subtekston. La reĝisorino nun estas entuziasma pri Esperanto kaj planas iam lerni ĝin kaj se eble fari dokumentan filmon pri Esperanto en Tajvano.
Organizas: Tajvanaj esperantistoj
Respondecas: s-ino CHO Myeong-ja [Ĝoja]

[**F-21**] Plej raciaj ciferoj kaj literoj en la mondo (8a, 15:10-16:40, diskutejo 6)

Komputeraj Ciferoj kaj Novaj Abakaj Ciferoj, kaj Universalaj Literoj Alfabetigaj disvolvitaj per inspiroj de Korea Hangulo kaj de Japana Kanao.
Organizas: Studa Societo de Ciferoj, Literoj kaj Lingvoj
Respondecas: s-ro HAYAKAWA Yoshinori (KN-J-251)
Vice respondecas: s-ro HIROSHIGE Ken (KN-J-221)

[**F-22**] Esperanto-rondoj japanaj kaj koreaj (8a, 15:10-16:40, lekciejo 2)

Interkonatiĝu, administrantoj kaj interesatoj de E-rondoj, kaj interŝanĝu viajn spertojn, informojn kaj opiniojn movadajn. Tio utilos ankaŭ por estontaj kontaktoj inter koreaj kaj japanaj.
Respondecas: s-ro INUMRU Fumio (KN-J-146)

[*__F-23__] Por komencantoj

(1) Lerni Esperanton per ludoj. Gvidos s-ino OSIOKA Taeko. (8a, 15:10-16:40, diskutejo 8)
(2) Parolu kun eksterlandanoj. Gvidos s-ino HUĜIMOTO Ricko. (9a, 11:10-12:30, diskutejo 2)
Respondecas: s-ro INUMARU Fumio (KN-J-146)

[**F-24**] Pri manĝkulturo en Japanio kaj Koreio (9a, 11:10-12:30, diskutejo 3)

Kompari kulturojn pri manĝaĵoj en Japanio kaj en Koreio, malfermita al ĉiuj kongresanoj
Respondecas: s-ino SAGUCHI Yuko (KN-J-238)
Vice respondecas: s-ino CHO Myung-ja

[**F-25**] Lernu dancon

(1) Bluso (7a, 16:20-17:50, halo)
(2) Valso (8a, 13:30-15:00, halo)
Ni amuziĝu per dancoj de bluso kaj valso. Komencantoj de danco estas bonvenegaj.
Respondecas: s-ro HO Song

[**F-26**] Gustumi Gimĉion (8a, 15:10-16:40, diskutejo 7)

Gustumu kun diversaj alkoholaĵoj korean faman tradician manĝaĵon "gimĉio" (peklaĵo, japane kimuĉi), faritan de lerta gimĉiistino Vera AN. La gimĉiistino ankaŭ instruos kiel fari bongustan gimĉion.
Respondecas: s-ino AN Jin-sim [Vera AN]

[**F-27**] Komencu Vian Podkasto-Elsendon! (8a, 13:30-15:00, diskutejo 6)

Lekcio kaj provo de sur-reta radio-elsendo Podkasto. Vi scios, kio estas Podkasto, kaj kiel oni lanĉu sian propran elsendon en la reton.
Respondecas: s-ro YAMASITA Tosihiro [belmonto] (KN-J-155)

[**F-28**] Mongola Centro de Universala Homama Asocio (9a, 9:30-11:00, diskutejo 4)

Mongola Centro de UHA prezentos la movadon de Universala Homama Asocio ĝenerale, inkluzive aktivadon de UHA en Mongolio kaj Japanio. Ene de fakkunsido oni mencios la kunlaboradon inter la Mongola Centro de UHA kaj Mongola Esperanto-Societo.
Respondecas: s-ro Chimedtseren Enkhee (prezidanto de Mongola Esperanto-Societo)

## 9. Budoj

[**B-1**] Gunma-Esperanto-Societo

Vendo de libroj (Raportoj el Japanio, Esperanto kaj mi, Vivoj tra la mondo), E-kalendaro, insignoj, E-happi kaj aliaj.
Respondecas: s-ro HORI Yasuo (KN-J-5)

[**B-2**] Libroservo de Japana Esperanto-Instituto

Vendo de libroj kaj esperantaĵoj.
Respondecas: s-ro ISINO Yosio (KN-J-11)

[**B-3**] Libroteko Tokio

Vendo de Esperantaj libroj kaj KKD (komputila kompakta disko).
Respondecas: s-ino SYOZI Keiko (KN-J-14)

[**B-4**] Jokohama Esperanto-Rondo (JER)

Vendo de Esperantaj libroj eldonitaj de JER. Ekspozicio pri la agado de JER en la urbo Jokohamo.
Respondecas: s-ino MIYAZAKI Hideko (KN-J-4)

[**B-5**] La 99a Japana Kongreso en Hokkajdo

Akceptejo de la 99a Japana Kongreso.
Respondecas: s-ro HOSIDA Atusi (KN-J-140)

[**B-6**] Korea Esperanto-Asocio

Vendo de libroj kaj esperantaĵoj.
Respondecas: s-ino MIN Hyeonkyeong [Honesta]

[**B-7**] Japana Esperanto-Junularo

Informado pri la 68a Internacia Junulara Kongreso (IJK), kiu okazos en la urbo Tenri, Japanio. Respondecas: OKABE Akiumi (KS)

[**B-8**] Pentraĵa ekspozicio

Koreaj esperantistaj pentristoj, s-ro HO Song, s-ro JEONG Byeong-mi kaj aliaj, montros siajn verkojn sur la muro de salono.
Respondecas: s-ro HO Song

[**B-9**] Rondo KTP

Prezenti verkojn (poemarojn) de Rondo KTP.
Respondecas: s-ino LEE Namhaeng [Feliĉa]

[**B-10**] Esperantista Asocio de Ŭonbulismo

Informado pri Ŭonbulismo kaj pri Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Meditado. Farado de "ŭonmani." Ŭonmani estas nomo de ornamaĵo, kiun oni faras el nodoj. Uzebla kiel kol-ringo, aŭ ornamaĵo por poŝtelefono ktp. La nomo signifas feliĉan vivulon.
Respondecas: s-ro KIM Kwang-soo

[**B-11**] Farado de portreto de Zamenhof

Por subteni la 68an IJK-on en Tenri, Japanio, oni vendos portreton de Zamenhof, faritan el silkosimila tradicia papero de Koreio.
Respondecas: s-ino AN Jin-sim [Vera AN]

[**B-12**] Oomoto

Oomoto estas la japana religio, kiu naskiĝis en 1892. Ekde 1923, Oomoto engaĝiĝas profunde en Esperanto-movado. Venontjare ni havos okaziĝon "Post-IJK" en la urboj Kameoka kaj Ajabe, sanktaj terenoj de Oomoto.
Respondecas: s-ro OKUŬAKI Toŝiomi (KN-J-201)

[**B-13**] JUSTAO

"JUSTAO" signifas la nomon de firmao por justa komerco. Ĝi vendas produktaĵojn de la triamondaj kontinentoj per reta hejmpaĝo kaj vendejo. Justa komerco ne estas subteno, sed interhelpo, kiu ne celas negative kontraŭi kapitalismon. Ĝi estas komerco kaj funkcias en la sistemo de merkato. Ni uzas Esperanton por interkomunikiĝi kaj por rompi la malriĉecon kaj maljustecon en la mondo de Azio, Afriko kaj Sud-Ameriko. Respondecas: s-ro AN Jong Soo

# 10. Ekskursoj

## 10-1. Duontagaj Ekskursoj

Duontagaj ekskursoj havas 4 kursojn. Ili ekiros post la ferma soleno de la kongreso. Ni akceptos vian aliĝon kaj pagon ĉe la kongresa giĉeto, en la 7a kaj 8a tagoj.

[D-1] Libera promenado kun ĉiĉeronoj en urbo Seongnam

Ni promenu laŭ la lageto en parko proksima al la kongresejo. Senpaga. Ĉiĉeronos s-ino LEE Namhaeng [Feliĉa], s-ino JOUNG Hyeon-Ju [Natura], kaj s-ro LEE Hong-Jin [Ario]

[D-2] Promenado en Seula Centro

Ni vagu al Insa-dong, Budhisma templo Jogye-sa, urbocentraj stratoj Sejong-ro, kie okazis la 3a Azia Kongreso en 2002, Cheng-gye-ro kaj la ĉirkaŭo. Poste ni babiladu kun frandaĵoj kaj trinkaĵoj. Kotizo: 10,000 ŭonoj por trafiko. Por vespermanĝo aparte, ĉirkaŭ 13,000 ŭonoj. Ĉiĉeronos s-ro HO Song.

[D-3] Promenado ĉirkaŭ monto Namsan(262m)

Ni ĝuos seulan panoramon. Ni vizitos Namsan-Seoul-Tower (Seulan Turon en Namsan), Namsan-Bongsudae (la signalejon per fajro kaj fumo), Myeongdong-Seongdang (Katolikan Preĝejon en Myeongdong), kaj Myeongdong-Artan-Teatron. Poste ni kune vespermanĝu. Kotizo: 25,000 ŭonoj (inkluzive de vespermanĝo kaj veturado inter la kongresejo kaj Namsan). Ĉiĉeronos s-ro KANG Hongu [Kanguruo].

[D-4] Promenado en Myeongdong

Ni vagu al katolikisma preĝejo Myeongdong, la vendejoplena strato, vagantaj junuloj kaj eĉ turistoj. Kaj poste babiladu kun frandaĵoj kaj trinkaĵoj. Kotizo: 10,000 ŭonoj por trafiko. Por vespermanĝo aparte, ĉirkaŭ 13,000 ŭonoj. s-ino AN Jin-sim [Vera] ĉiĉeronos.

## 10.2 Postkongresa Ekskurso

Postkongresan Ekskurson povas partopreni nur kongresanoj antaŭmendintaj. Surloka aliĝo ne eblas.

**10a de okt.**:

09:00: Ekiri, per 3 turismaj busoj. (Unu el la tri busoj estas por tiuj, kiuj volas elbusiĝi en la urbo Seulo [ĉe metroostacio Gangbyeon], survoje al Incheon.)

11:00: Rigardi Gyeongpo-lagon kaj Gyeongpo-strandon en Gangneung.

13:00: Tagmanĝi: ĝenerala manĝo kun bakita fiŝo.

15:00: Viziti Soraksan-monton, la ŝtatan parkon, veturi per surĉiela kablo-tramo, viziti budhisman templon Sinheungsa.

18:00: Viziti Templon Naksansa, rigardi Naksan-strandon kaj fiŝvilaĝan haveneton Daepohang.

19:00: Vespermanĝi: ĝenerala manĝo kun krudaj fiŝoj kun biero kaj soju, korea plej ofte trinkata alkoholaĵo.

22:00: Eniri en tranoktejon, la feri-ripozeja gast-hotelo (kutime nomata Kondo aŭ Kondominium).

**11a de okt.:**

09:00: Matenmanĝi, la gast-hotela kutima manĝo.

10:00: Eliri el la gast-hotelo, kaj ekveturi per turismaj busoj al flughaveno Incheon.

11:00: Rigardi akvofaleton Osaekyaksu en Yangyang.

12:00: Tagmanĝi kun montaj manĝherboj.

13:00: Rigardi el monttransira vojo Hangyeryeong

16:00: Alveni la flughavenon Incheon.

## 10.3 Ekskurso de Komuna Seminario

La ekskurso de KS okazos en la 10a tago, al la urbo Suwon. Ni vizitos antikvajn palacon, fortreson kaj muzeon. Rajtas partopreni nur antaŭmendintoj. Gvidos la ekskurson f-lo KIM Young-Long.